



Norvega Esperantisto

ESP ERANTOBLADET

N-ro 9/10 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Cefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

GEOGRAFIAJ NOMOJ EN ESPERANTO

El artikolo de Tibor Sekelj en IOE-Gazeto ni permesas al ni represi la plej gravan parton, ĉar ĉi tio estas temo, kiu interesas ĉiujn.

Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Mainz, en 1958, dum publika kunveno de la Akademio de Esperanto mi proponis la formigon de internacia komisiono por ordigi la geografian nomaron en Esperanto, kaj ĉesigi la ekzistantan haoson. Laŭ tiu propono, la komisiono povus konsisti el proksimume ses akademianoj interesitaj pri geografio, kaj ses geografoj interesitaj pri la lingvo, kaj prezidus ĝin la prezidanto de la Akademio de Esperanto kune kun la prezidanto de la Internacia Geografica Asocio — IGA.

La propono estis akceptita, kaj post intensa korespondado la Komisiono por ORDIGO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ estis formita.

Ĝis hodiaŭ partoprenis la laboron S-roj Butler, Faulhaber. Prof Mablesone, Doc. Stöp-Bowitz, S-ro Thomson, Lic. Sekelj, Prof. Waringhien.

La Komisiono por Ordigo de Geografiaj nomoj ne prenis sur sin ian ajn aŭtoritaton por provi altrudi al la Esperanta popolo la fiksitajn nomojn. Ĝi nur faris sian eblon, uzante siajn lingvajn kaj geografiajn spertojn, sugestis la eblecon, laŭ ĝia oponio plej taŭgan, por ĉesigi duoblan aŭ eĉ trioblan nomigon por certaj geografiaj objektoj, kaj tiel ĉesigi tiun ĉi plej glitan kaj plej oftan diskuttemon en Esperanto. Ni tuj diru an-

kaŭ, ke la komisionanoj mem reprezentis la plej diversajn starpunktojn, kaj tre ofte inter ili mem ne estis atingita unueca solvo. En tiuj kazoj la decidoj estis faritaj per plimulto de voĉoj.

La rezulto de tiu okjara laboro estos publikigita en formo de maparo, kaj starigita je la dispono de la esperantistaro. Ni scias ke multaj nomoj ne povos kontentigi ĉiujn esperantistojn. Tial ni bonvenigos kritikojn kaj principajn kaj detalajn koncernantajn unuopajn nomojn. La Komisiono kolektados tiajn opiniojn dum la proksimaj 4 aŭ 5 jaroj, kaj tiam surbaze de tiuj rimarkoj ĝi reviziosian nomaron, kaj tiam la pli malpli definitiva nomaro estos publikita.

La diverseco de opinioj estis evidenta ekde la komenco de nia laboro. Sed ĝi fariĝis iom akra kiam alvenis la vico al la landnomoj. En pluraj kazoj estis necese ke ambaŭ kunordigantoj apelaciu al la prudento kaj tolereemo, kiel sola garantio por la sukcesa fino de nia entrepreno.

En la komenco de nia laboro mem ni devis interkonsenti pri kelkaj ĝeneralaj principoj de laboro. La du bazaj principoj fiksitaj estas jenaj:

1) La geografiaj nomoj estos esperantigitaj laŭ ortografio, elparolo aŭ signifo, en ĉiu individua kazo, konsiderante la internacian uzon kaj la jam akceptitan praktikon.

Tiu ĉi principo koncernas unuavice la nomojn de la geografiaj objektoj kun
(Daŭr p. 121)

UNESKO- novaĵoj

SATELITO OBSERVOS ELEFANTOJN

Satelito en la serio «Nimbus», lanĉota fine de 1967, kolektados signalojn el etaj elsendiĵoj fiksitaj al la dorsoj de elefantoj en la regiono Tŝavo en Kenjo. Usonaj sciencistoj povos ricevi per la satelito informojn pri la pozicioj, temperaturoj kaj humidecoj de la migrantaj bestoj.

LA FRANCA LINGVO PLI LERNATA EN SOVETAJ LERNEJOJ

En la lastaj jaroj rapide kreskis la nombro de infanoj, kiuj lernas la francan lingvon en Soverta Unio. Kvankam la angla restas la plej lernata fremda lingvo, la franca nun staras sur la dua loko egale kun la germana. En la Rusa SSR sola lernas la francan pli ol duona miliono da infanoj, kaj ĉiu kvartalo de Moskvo havas unu lernejon, en kiu la franca estas la instru-lingvo por ĉiuj studobjektoj.

LASERO ANSTATAŬAS LA TAJLORAN TONDILON

Kostumojn eble iam tajlos laseroj sub gvido de komutilo, se sukcesos la eksperimentoj, kiuj lastatempe iniciatis brita tajlora kompanio. Nuntempe la firma produktas preskaŭ unu milionon da kostumoj jare, ĉiuj laŭ menditaj mezuroj, kaj por ĉiu kostumo unu fakulo bezonas duonan horon da tondado. La firma akiris laseron kapablan tranĉi du tavolojn da drapo je rapideco de 3 metroj minute; en la eksperimenta sistemo la lasero kaj la drapo restas senmovaj, dum aŭtomate gvidataj speguloj kaj lensoj direktas la lumradion. Alia avantaĝo estas, ke la lasero fiksas per sia varmo la tranĉitan randon de la ŝtofo, tiel ke ĝi poste ne disfadeniĝas. La kompanio opinias, ke post kelkaj jaroj, kiam estos pretaj pli potencaj laseroj kapablaj tranĉi dikan ŝtofon tre rapide, la sistemo estos uzebla jam en komerca skalo.

PLEJ MALNOVA NEOLITIKA URBO

Arheologoj en Turkujo konstatis per radioaktivecaj esploroj, ke la neolitika urbo ĉe Catal Höyük estas sendube la plej malnova neolitika urbo ĝis nun konata — konsiderinde pli aĝa, ol Jeriĥo on Palestino.

MALTRANKVILIGAJ PERSPEKTIVOJ DE LA NUTRO-PROBLEMO

Trideko da elstaraj biologoj el 20 landoj publikigis deklaron, en kiu ili esprimas «seriozan maltrankviliĝon pro la kreskanta diferenco inter la nivelo de nutraĵo-produktado kaj la nivelo necesa por la digno kaj bona kvalito de la homa vivo».

Kunveninte ĉe la Domo de Unesko en Parizo kiel membroj de la Speciala Komitato por la Internacia Biologia Programo, ili avertis jene:

«Teknikaj plibonigoj espereble povos iom redukti la nombron de mortoj pro malsato, sed ili ne alvenos ĝustatempe por eviti multe da sufero kaj la pli daŭrajn efikojn de neadekvata nutro ĉe la junularo de la sekvanta generacio.»

Ili urĝis biologojn de ĉiuj landoj «disponigi siajn servojn por klarigi la rilatojn de loĝantaroj problemoj».

KUIRI PER LA SUNO

La Nacia Fizika Laboratorio de Israelo pretigis sun-kuirilon, kiu sub forta sunbrilo kapablas boligi 2 litrojn da akvo en 22 minutoj. La aparato konsistas el fera framo kun 12 precize samaj konkavaj speguloj, 30 cm larĝaj, kiuj direktas la sunradiojn al la subo de la kuirpoto. Ĝin munti povas persono tute sen ia teknika scio aŭ sperto, kaj oni povas malmunti kaj kompakte enpaki ĝin por transportado. Ĝi kostas nur 10—12 dolarojn.

La kuirilon oni elprovis jam en la dezerto Negeb kaj nun sendis eksterlanden por provado sub aliaj lokaj kondiĉoj. Ĝi havas la plej grandan valoron por regionoj tropikaj aŭ sub-tropikaj, kie krome mankas ligno kaj kie elektro estas manka aŭ multekosta.

Israelaj sciencistoj jam sukcese pretigis ankaŭ aliajn aparatojn, kiuj funkcias per sunradioj: akvo-varmigilon, jam uzatan en 100 000 hejmoj en Israelo, kaj elektro-generilon.

MULTRASAJ SOCIOJ STUDOTAJ

Venontjare ekfunkcios en Barbados esplorcanto por studoj pri multrasaj socioj, laŭ prof. Asa Briggs, kiu lastatempe vizitis la insulon. La centro estos komuna institucio de la Universitatoj de Sussex kaj de Karibaj Insuloj.

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Røsbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20-a en la monato
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,00

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Dudek jaroj

Denove jaro finiĝas. Oni sendas salutojn. Oni sendas varmajn bondezirojn.

Ankaŭ nia gazeto deziras al ĉiuj bonan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron.

Ĉe farfino oni ankaŭ kutimas pensi: kiel rapide la jaroj pasas! Ankaŭ la redakcio devas same konstati. Ni tion konstatas konstante: tuj, kiam aperis unu numero de la gazeto, la sekvanta estas en preparo. La preparado neniam ripozas.

Iom post iom fariĝis 20 jaroj. Efektive estas jam pli ol kvinona jarcento, ke la nuna redakcio okupiĝas pri Norvega Esperantisto.

20 jaroj estas periodo tiel longa, ke oni vere rajtas halti momenton por rememori — kaj por danki.

Ni do deziras, ĉe la fino de la jaro, kaj ĉe la komenco de la tria jardeko, ne nur bondeziro, sed ankaŭ danki al ĉiu pro intereso, bonvolo kaj indulgo.

FORTOJ DE L'VIVO

de Vilho Setälä

Diversaj rakontoj, eseoj, K.c., multaj
fotografajoj.

Bindita kr. 37,00, broŝurita kr. 20,00
Aldonu 10 % al la prezoj por
sendkosto.

Eldonejo Esperanto, Boks 942, Oslo 1.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Kursoj. Nun estas la tempo por plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Klubo, kiuj spite al nia insista alvoko, tamen ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniuj progresoj. Kaj ĉiuj kluboj devas ja progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,00; ambaŭ partoj kune: kr. 42,00. Por ano de studondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

Diversaj rakontoj, eseoj, k.c., multaj Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por la kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi la kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de nova Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkularporton kaj bilancon. La reviziorejo kontrolas ke la kasisto faras tion kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pritraktas la jarraporton, kalkularporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno

al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jar-kvarono kaj studraporton pri la 2a jar-duono de la pasinta jaro (Bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raportojn pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

NOVA PROPAGANDFOLIO

La mezaj paĝoj de ĉi tiu numero estas nova, reviziita eldono de nia konata propagandfolio. Petu kvanton de ĝi laŭ bezono, kaj vaste utiligu ĝin!

La Estraro.

BONDEZIRAJ KARTOJ

Per tio ĉi ni informas vin, ke USA eldonis du seriojn de bondeziraj kartoj kun teksto en Esperanto por la jarfina sezono, nome:

1. Serio de 6 duoblaj kartoj kun kovertoj «Mondfamaj Pentraĵoj» (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo). Tre belaj koloraj reproduktajoj. Prezo: 3,75 gld.; 11 steloj.
2. Serio de 6 poŝtkartoj novjaraj «Ora Jarcento Holanda» (Rembrandt k. a.). Same belaj reproduktajoj. Bondeziro bildflanke. Titolo de la bildo en Esperanto dorsflanke. Prezo: 1,50 gld.; 6 steloj.

Internacia renkontigo

de komercistoj/esperantistoj okazos dum la printempa foiro 1968 en Leipzig, sabaton, 9.3., 19a horo, en: Klub der Intelligenz «Gottfried Wilhelm Leibniz», Elsterstr. 35. Post modesta kulturprogramo estos eblecoj konversaciadi laŭdezire. Interesuloj anoncu partoprenon al: Germana Kulturligo — Esperanto, GDR 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

Sveda jarkongreso 1968

La Jarkongreso de SEF okazos 1968 en Sundsvall, kaj pro tio ke la urbo situas norde en la longa lando, ni jam nun volas sciigi al la esperantistoj, kiuj loĝas en norda parto de Finnlando, Norvegio kaj Svedlando, ke vi venontjare havos okazon viziti kongreson sen longega vojaĝo al sud. Ne miskomprenu nin, gesamideanoj en sudaj regionoj, ĉiuj estas bonvenaj al la SEF-kongreso pentekoste 1968, sed mia unua penso estas: nun estas okazo por unuopaj esperantistoj en la nordo viziti kongreson sen tro longa vojaĝo. Por la esperantistoj en Trondheim kaj ĝia regiono estas vojaĝo per aŭto aŭ trajno al Sundsvall nuntempe tre agrabla. Ankaŭ la esperantistoj en Waasa, Tampere kaj ĝia regiono havas per la ŝipoj inter Waasa, Sundsvall tre oportunan kaj agrablan vojaĝon. Ni, Amika-Rondanoj en Sundsvall, invitas la samideanojn en najbaraj landoj kune kun la svedaj esperantistoj veni al la SEF-kongreso dum la unuaj tagoj en junio, kiam la nordlanda naturo en sia hele frusomera vestaĵo estas mirinde bela.

Ni revenos en la januaraj numeroj de respektivaj esperantogazetoj per alloga programo de la kongreso kaj per sciigo pri esperanta poŝtstampo kaj kongresaj glumarkoj aĉeteblaj.

Ĝis tiam salutas vin elkoire Amika Rondo,
pere de *Torsten Farm.*

Nova formulo de feriado eksterlande: «Internaciaj kulturaj ferioj»

Ekde 1968 la Jugoslavia Turisma Fakdo de IOE, administrata de Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb, lanĉas novan formulon de feriado eksterlande kun triobla celo: oferi al esperantistoj agrablajn feriojn en la plej konataj turismaj lokoj, disvastigi Esperanton inter turistoj kaj plioftigi la uzadon de la Internacia Lingvo fare de la turismo-fakuloj.

Ĉiusemone la esperantistoj estos petataj viziti difinitajn turismajn lokojn en difinita periodo, uzante tie nepre nur Esperanton en turist-oficejo, hotelo, restoracio, vendejoj, ktp. dum ilia restado. Per la koncentrita premo, kiun ili tiel faros ili devigos la turis-

majn instancojn aktive interesiĝi pri Esperanto. Post 2—3 jaroj da simila premo, estas pli ol verŝajne ke en la koncernaj lokoj oni ankaŭ povos ricevi respondon en Esperanto. Cetere la kunestado de gesperantistoj en tiuj turismaj lokoj certigas agrablan societon. Dum la restado la gesamideanoj povos ĉeesti diversajn kulturajn aranĝojn tute aŭ parte en Esperanto, kiuj okazos ankaŭ por ĝenerala publiko (io aparta estos entreprenata en la kampo de kanzono kaj teatro).

Dua parto, de la «Internaciaj Kulturaj Ferioj» konsistos el specialaj rapidkursoj de Esperanto, kun elektita ferio-vortaro kaj laŭ metodo kiu ebligas la ĉeeston de gelernantoj el kiu ajn nacio. Por tiuj kursoj, kiuj kostos nur 100 ND (8 \$), ni petas la gesamideanojn aktive propagandi inter la parencoj aŭ geamikoj, kiuj ŝatus ferii en Jugoslavio. La kursoj ne forprenos pli ol du horojn ĉiutage kaj tamen garantias relative fluan paroladon ĉe la fino de dusemajna restado.

La sukceso de la tria parto de la aranĝoj: la esperantigado de la turismaj servoj, kiu estas la ĉefa celo plene dependas de la sukceso de la du unuaj, do de vi gesamideanoj.

Jam estas interkonsentitaj kun la lokaj turism-oficejoj «internaciaj kulturaj ferioj» de la 1-a ĝis la 15-a de Junio 1968, ĉe la mirinda montara lago de Bled (Slovenio) kaj de la 15-a ĝis la 31-a de aŭgusto en Rovinj (Istrio), unu el la perloj de Adriatiko. Aliaj aranĝoj okazos ankaŭ en Dubrovnik, Opatija, Poreč kaj Zabljak, en la aliaj periodoj de la somero, tiel ke ciam unu el la plej gravaj ferilokoj de Jugoslavio estu koncentriĝo-punkto por esperantistoj, kiuj povas viziti la landon en tiu tempo.

Jam nun decidu pasigi vian ferion 1968 en Jugoslavio, por kunigi utilon kaj agrablon! Por ricevi informojn pri la turismaj lokoj en kiuj okazos la aranĝoj bonvolu skribi en Esperanto al la koncernaj turism-oficejoj (ekz. de sufiĉa adreso: Turist-oficejo, Rovinj, Jugoslavio). Ne kontentiĝu per petado de prospektoj kaj laŭbezone skribu plurfoje kaj detale, ĉar la tradukado de viaj leteroj estos konfidita al ni kaj pagata, kio donos ŝatindan fonton de enspezoj por nia agado. Se vi ne ricevas respondon en Esperanto aŭ en via propra nacia lingvo, bv. resendis la leteron, dirante ke vi ne komprenas. Ankaŭ tio estas maniero helpi nin.

Tamen pri informoj rilate la kursojn, tur-

Ni uzu taugan sloganon!

Estas fakto, facile kontrolebla kaj nepre bedaŭrinda: Tre granda plimulto da nuntempuloj ankoraŭ ne scias, ke ekzistas neŭtrala internacia lingvo kaj ke ĝia nomo estas Esperanto. Aŭ inverse: kiam tiuj nuntempuloj legas aŭ aŭdas la nuran vorton «Esperanto», ili ne scias, kion ĝi signifas. Tio pravas ke, spite al la laŭdindaj klopodoj fariĝintaj de la diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj de miloj da fervoraj Esperantistoj, la informado de la granda publiko estas nesufiĉa kaj do devos esti multoble pli-ampleksigita.

Por intense pli-vigligi nian tutmondan informad-kampanjon, la subskribinto proponas grandskale uzi novan varb-sloganon, uzeblan en ĉiuj landoj, nome la nacilingvajn tradukojn de la okulfrapa kaj facilkomprenebla demanda frazo: «Ĉu vi parolas Esperanton?»

Estas tuj videble, ke la sloganoj «Parlez-vous Esperanto?» — «D'you speak Esperanto?» — «Sprechen Sie Esperanto?» — «Parla Esperanto?» — «Habla usted Esperanto?» — «Spreek u Esperanto?» — k.t.p. estas multe pli elvokivaj ol ofte uzataj nunaj varb-sloganoj (ekzemple la imperativa, ne preciza, tro altruda kaj do malbon-efika «Lernu Esperanton!»), ĉar tiuj demandaj frazoj kun la verbo «parolas» tuj komprenigas al ne informitaj eksteruloj, ke Esperanto estas parolebla kaj parolata lingvo. Praktikaj provoj, dum kelkaj semajnoj, de la francalingva «Parlez-vous Espéranto?» konvinke demonstros ke, kvazaŭ aŭtomate, ĝi elvokas respondon (nuntempe plej ofte nean, kompreneble) kaj samtempe vekas scionon kaj ankaŭ interesiĝon ĉe multaj preterpasantoj.

La ĉi tie proponita slogano estas diversmaniere uzebla: per stampiloj kaj glumar-

niĝu rekte al IOE-Turisma fakdo, Studenta Esperanto-Klubo, Amruševa 5, Zagreb, Jugoslavio. Cetere detala broŝuro pri la aranĝoj aperos antaŭ la Nova Jaro.

Samokaze ni alvokas al nepre organizado de similaj aranĝoj en ĉiuj turismaj landoj, por pli facile konvinki turistojn lerni Esperanton. Interesiĝantoj nepre kontaktu kun ni! Ni liveros detalan laborplanon.

R. I.

RECENZOJ

Montagu C. Butler: Esperanto-English Dictionary. Eld.: The British Esperanto Association, London, 1967. 450 p. bindita.

LA ESPERANTA KONJUGACIO

Teo Jung: La esperanta konjugacio. 2 vol., sume 245 paĝoj. Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1965, 1966.

En elementaj kursoj kaj lernolibroj oni kutime dediĉas nur suprajn atenton al la 6 participaj formoj kaj al la multaj kunmetitaj formoj konstrueblaj per ili. Eble tion grandparte kaŭzas la fakto ke ĝis nun ĝisfunda esploro kaj analizo de la Zamenhofa lingvouzo sur tiu kampo mankis. Ĝuste tian esploron Jung entreprenis kaj modele plenumis.

Sisteme li esploris jenajn 14 verkojn de Zamenhof: Ekzercaro, Georgo Dandin, Fabeloj de Andersen I—IV, Hamleto, Ifigenio en Taŭrido, La rabeno de Baharah/La gimnazio, La rabistoj, La revizoro, Lingvaj Respondoj, Marta, Proverbaro. Sur la proks. 1800 paĝoj de tiuj verkoj li trovis ĉ. 75 000 formojn tempajn aŭ tempe klarigeblajn. Inter tiuj estas 10 317 participaj formoj: 2 843 kunmetitaj verboformoj kaj 7 474 aliaj. Detala analizo de tiuj formoj evidentiĝas ke Zamenhof ĝenerale uzis la participojn konforme al la tempaj indikoj de la 6a regulo de la gramatiko, nur 100—125 formoj unuavide ŝajnas tempe deviaj, sed ankaŭ tiuj formoj estas klarigeblaj el vidpunkto de stilo aŭ de lingva manipuleblo. La diskuteblaj formoj faras entute nur 0,17 %, aŭ 1

koj; sur kovertoj, poŝtkartoj, insignoj, flagetoj, kalendaretoj kaj aliaj reklam-artikoloj; inform-broŝuroj, lernolibroj, kaj simile.

Realigajojn laŭ tiu propono oni bonvolu sendi al Esperanto-Societo F-68 MULHOUSE (24 av. de Riedisheim — Franc.), kiu sendos, interŝanĝe, franclingvan afiŝeton (formato 10 x 27 cm) kun la slogano «Parlez-vous Espéranto?» kaj kun prova aldona argumento.

A. Lienhardt

Dumviva membro de U.E.A.

kontraŭ 600 nediskuteblaj. Bedaŭrinde Jung ne faris similan statistikon pri la formoj, kiuj devias de la aspekta vidpunkto, sed inter la ekzemploj oni facile rimarkas tiajn.

Dum la lastaj jaroj oni ofte aŭdis la aserton ke la Zamenhofaj -is -ita formoj signifas simplan preteriton. En la 6 verkoj Fabeloj I—IV, La revizoro kaj Marta troviĝas 194 -is -inta formoj, kiuj ĉiuj estas antaŭpreteritaj, kaj 938 -is -ita formoj, el kiuj 897 estas klare antaŭpreteritaj (pluskvamperpektaj), kaj nur 41 (4 %) diskuteblaj.

Efektive Zamenhof uzis la pasivajn participojn tre elaste, ne konsiante pri iu «problemo» kaj ne farinte el ili specialan sistemon. Li ripetite uzis ekz. -ata por unufoja finita ago (La foiraj komercaĵoj devis esti pakataj) kaj ne hezitis uzi formojn kiaj

La IV-a internacia esperantistoferio 17.—30. IX. 1968 - Miedzygórze - Pollando

Post grandega sukceso de la Tria IEF, kiun partoprenis 450 geesperantistoj el 15 landoj, interalie el Novzelandoj, Usono kaj Japanioj *de 17 ĝis 30 de septembro 1968 en pitoreska montara ripozloko Miedzygórze okazos la IV-an Internacia Esperantista Ferio*. La Ferion organizas Feria Fako de Polaj Sindikatoj kaj Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio.

La Ferion oni povas partopreni nur por du semajnoj. Partoprenkotizo estas 700 zł = 30 US dol.

La partoprenkotizo ampleksas la tutagan manĝadon, tranoktadon en 3, 4, aŭ 5 personaj ĉambroj kaj aliajn programerojn. Por la geedzparoj estas rezervitaj 30 dupersonaj ĉambroj.

La partoprenkotizon oni devas sendi en iu ajn valuto per poŝt- aŭ banko-mandato al la poŝtekkonto de Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, PKO Wrocław n-ro 8—9—250.

Al Miedzygórze oni povas veni per trajno kaj aŭtobuso aŭ per propra aŭtomobilo.

Detalaj informoj pri la Ferio, aliĝiloj kaj invitiiloj estas riceveblaj de: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, WROCLAW-17, Poŝtkasto 8, str. Du-bois 3, Pollando.

amita, konita, kiuj laŭ Plena Gramatiko estas eraraj.

El ĉi tiuj linioj ne konkludu ke la verko estas nura statistiko. Efektive ĝi donas pli ol 1 000 ekzemplojn, plejgrandparte Zamenhofajn, kaj abundon da komentarioj kaj klarigoj. Vere ĝi estas trezorejo por ĉiu, kiu deziras profundigi en la lingvouzon de Zamenhof. Aliflanke dum la lastaj jaroj neniu pli sincere ol Jung klopodis por repacigi la bedaŭrindan partipan kverelon. Se lia verko estus aperinta 10 jarojn pli frue, eble tiu batalo estus evitita.

Ŭatelio.

DU ĈINAJ LIBRETOJ

«La varma sudo kaj frosta nordo.» libreto eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Peking.

Jen eta libreto temanta pri du infanoj. Verse skribita kun sufiĉe belaj desegnaĵoj. Rakonteto pri ilia ĉiutaga vivo, kun malbone kaŝita komunist propaganda. Laŭ mia opinio oni ne devas enpaki komunistajn teoriojn en tiajn libretojn, pri tio oni skribu en fakaj artikoloj kaj broŝuroj.

*

«Ĉasado kun avĉjo.» Eldonis Fremdlingva Eldonejo en Peking. Libreto enhavanta rakonteton pri knabeto kaj lia avo. Ili ekskursas por ĉasadi, kaj kompreneble ambaŭ tre sukcesas en tiu agado. La admiro de la knabo por la avo estas grandega! La desegnaĵoj estas belkoloraj, kaj la rakonteto donas viglan bildon pri la sovaĝaj bestoj kiuj troviĝas en Ĉinio. Bela legaĵo por infanoj kiuj deziras pligrandigi sian esperantan vorttrezoron.

Elna Matland.

LA ESPERANTA PASIVO

Friess, Heinrich: Ĉiuj formoj de la pasivo . . . 15 paĝoj. Prezo (inkl. sendkostoj) 2 rkp., rekte ĉe la aŭtoro (Studentenstrasse 6, 6407-Schlitz, Germanujo).

La aŭtoro volas klarigi la «kompleksajn verboformojn» laŭ plejble malkomplika maniero surbaze de la Zamenhofa 6a regulo. Efektive la verko enhavas kelkajn tre interesajn rimarkigojn pri la verboj, ekz. la aŭtoro avertas ke la participoj ne estas verboformoj, ĉar ili ŝanĝigas laŭ numeroj (ekz. amata, amataj), kaj laŭ la 6a regulo de la Fundamenta Gramatiko: «La verbo ne estas

ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj». Sekve oni konsideru la participojn ne kiel verbojn, sed kiel ordinarajn adjektivojn. La frazoj «Li estas amata» kaj «Li estas aminda» estas gramatike egalvaloraj.

Sekve de tiu vidpunkto li neas la ekziston de «kompleksaj verboformoj», konsiderante ke ili ĉiuj esprimas statojn.

Tre interesa estas lia analizo de la Zamenhofa Lingva Respondo n.ro 110, kiun oni povas klare formuli tiel: «Kiam iu ion faras (faris, faros), tiam EN TIU MOMENTO, t.e. en la momento de la faro, la io estas (estis, estos) farata de la iu».

Fine la aŭtoro tre saĝe avertas kontraŭ perforta malhelpo de la natura lingva evoluo, en la senco de la rezolucio de la Norvega Esperanto-Kongreso en Sauda.

Entute valora kontribuo al la serioza pristudado, kiun postulas la interpretado de la Esperanta verbsistemo.

Ŭatelio.

LA ESPERANTO-SOCIETO

Eldonis U.E.A. Prezo 1,50 guldenoj.

La broŝuro enhavas tre elstarajn artikolojn pri la esperantosocieto, kun abundaj konsiloj por gvidado de grupo. Mi mem ĝuis la legadon de ĝi, kaj trovis en ĝi bonajn ideojn kaj saĝajn pensojn. Precipe mi ŝatis la artikolon de Maurice Jaumotte: «Kiel vivadigi niajn lokajn grupojn.» La artikoloj aperis unue en la revuo Esperanto, sed ĉi tie ni trovas ilin kolektitaj. Nepre havinda al ĉiu klubo, ĝi donos al vi inspiron kaj ideojn.

Elna Matland.

HINDO RIGARDAS LA VIVON

Lakshmiwar Sinha: Jaroj sur tero. 126 paĝa, bindita. Eldonis: Eldona Societo Esperanto, Malmö.

La hindu Sinha vivis riĉan vivon, kaj scias lerte rakonti pri ĝi. Tial li donis al ni valoran libron, kiu havas specialan intereson inter okcidentanoj. Oni ja iam diris, ke Oriento kaj Okcidento neniam povas renkontiĝi. Sed tiu libro estas inter la multaj, kiuj iom post iom tamen povas instrui tiom, ke ni povas interkompreniĝi.

Sinha rakontas pri sia vivo en Hindujo, kiel pri siaj vojaĝoj en Eŭropo. El la rakontoj el Hindujo ni lernas multon pri moroj kaj religio en lia medio. Sed jen mia sola kritiko al la libro: Kvankam estas notoj je

la fino de la libro, kiuj klarigas la tre multajn fremdajn, hindajn, esprimojn, la legado iĝas tro malfacila. La libro plivalorus, se oni ankaŭ (sed ne nur) aldonus tiujn klarigojn per piednotoj kiam la unuan fojon oni renkontas la esprimon. Oni ankaŭ sentas, ke la simbolaj vinjetoj havas ian signifon, sed la libro ne donas klarigon pri ili. Jes, kaj en la glosaro oni diras: «Bonvolu konsulti ankaŭ la notojn» en «Nepalo malfermas la pordon» kaj «Malŝata ŝtono». Tio eĉ pli igus la legadon malfacila — kaj ja ne ĉiu posedas ambaŭ librojn.

Mi tute samopinias kun la eldiro de Bertil Nilsson sur la kovrilo: «La riĉa kultura tradicio de Hindujo kaj modernaj kulturaj impulsoj de Nord Eŭropo renkontiĝis kaj kunfandiĝis en lia persono», kaj esprimas la deziron, ke multaj esperantistoj legu tiun libron.

Haro.

ĈARMA LIBRETO

«Multekolora bukedo» de Gösta Henriksson. Diverstemaj artikoloj kaj personaj rememoroj. Eldonis la verkisto. Multobligita. Prezo 4 sv. kr.

Mi devas konfesi ke mi ne ŝatas multobligitajn librojn, speciale ne en Esperanto, ĉar tiujn mi ne kuraĝas montri al miaj ne-esperantistaj geamikoj. Tamen- ĉi tiun libreton mi ekŝatis laŭ eksteraj, ĝi estas beleta, kaj plaĉa.

La verkisto en sia antaŭ-parolo simple konfesas ke li eldonis la libron ĉar li ŝatas verki! La rakontoj estas tre diversaj laŭ enhavo, legante ilin oni sentas ne nur la grandan amon por la skribado kiun posedas la aŭtoro, sed precipe lian grandan veran amon al literaturo entute.

La libreto estas ĉarma, interesa legaĵo, kaj fakte taŭgas ankaŭ por novuloj pro la klara lingvo kaj la mallongeco de la historioj.

Elna Matland.

BONA ISRAELA LIBRO

Reuven Kritz: Freŝa mateno. Tradukis Ota Ginz. Eldonis: Libro «Pura» en Israelo. Prezo 1,80 dolaroj.

Reuven Kritz estas tre konata hebra verkisto, precipe li verkas pri la gejunuloj kaj ilia vivo en la moderna Israelo. Tiel ankaŭ en ĉi tiu libro, kiu estas altkvalita laŭ enhavo, modela laŭ lingvo esperanta, kaj ankaŭ

tre aktuala pro la multaj okazintaĵoj en tiu lando en la lasta tempo.

Temas pri knabeto kiu en siaj infanaj jaroj loĝis en Vieno, sed pro ekdezigo inter la gepatroj, devas trovi novan hejmon en Israelo, li ja estas jud-devena.

En la libro ni trovas en romana formo multajn informojn pri la kibuca vivo, vere ni vidas ĝin de interne legante pri la knabo kaj liaj kamaradoj. La aŭtoro malkaŝas sian bonan konon je infanoj kaj iliaj sentoj, krom tio la rakonto estas ĉarma, streĉiga, kaj kiel mi aludis jam: la lingvo estas fakte modela, mi ĝuis la legadon de ĝi. Jen libro kiu riĉigis nian esperantan bibliotekon, sendube!

Elna Matland.

ETIMOLOGIO

Klein's Comprehensive Etymological dictionary of the English Language. Volume I A—K. Eld.: Elsevier Publishing Company, Amsterdamo, 1966. 854 paĝoj, bindita. Prezo: Fl. 90,00.

Theodor Adorno diris: «Post Auschwitz oni ne povas verki.» D-ro Ernest Klein, kiu mem travivis la terurojn de Auschwitz, kaj kies preskaŭ tuta familio estas ekstermita, pruvis la malon. Verŝajne Adorno celis romanojn kaj poemojn — d-ro Klein verkis etimologian leksikonon.

Kial menciigi anglan etimologion en Esperanto revuo? Pro tio, ke la angla kaj la Esperanta lingvoj grandparte havas la samajn radikojn, kaj pro tio, ke angla etimologia leksikono tial devas esti tre interesa por esperantistoj.

Ni jam posedas la Naŭlingvan Etimologian Leksikonon de generalo Bastien, kaj ĝi estas tre interesa. Sed ĝi ne donas la originan etimologion de la vortoj, nur komparon de la Esperantaj vortoj kun la latinaj, francaj, italaj, hispanaj, portugaliaj, germanaj, anglaj kaj rusaj. Mankas unu el la plej gravaj: la greka.

La leksikono de d-ro Klein difinas la vortojn antaŭ ol doni la etimologion, kaj ankaŭ aldonas informojn, kiuj respegulas la historion de la homa kulturo. Ofte la aŭtoro diskutas derivaĵojn de vorto, pri kies etimologio la sciencistoj ne estas samopiniaj, kaj tiel donas ankaŭ ideon pri metodoj de la lingvistoj.

Speciale interesa estas, eble, por ni, kion la aŭtoro informas pri Esperanto:

Det internasjonale språket - ESPERANTO

*En orientering vesentlig bygget på et opplysningskrift utgitt av
The National Education Association, Washington.*

TRENGER VI ET INTERNASJONALT SPRÅK?

De fleste er sikkert enige med USA's tidligere president, Truman, i at det «å lære andre nasjoner å kjenne er nødvendig for internasjonalt vennskap og samarbeide» og at «en av de største hindringer som står i veien, er de mange forskjellige språkene.»

Før i tiden ble internasjonale forbindelser besørget av eksperter som ofret flere år av sitt liv på språkstudier. I vår tid vil vi alle være med i dette samarbeidet, eller som den amerikanske statssekretæren George Allen uttrykte det: «Mennesker må tale med mennesker.»

Men hvordan skal dette bli mulig så lenge språkforskjellene danner nærmest uoverstigelege hindringer? Bill Cunningham i Boston Herald gir svaret: «Det kan aldri bli én verden for vi får et språk — et effektivt språk, som alle mennesker i verden kan tale, skrive og forstå.»

HVORFOR IKKE ENGELSK ELLER LATIN?

Et nasjonalspråk kan ikke tilfredsstille de kravene man må stille til et internasjonalt språk, bl. a. fordi alle nasjonalspråk er for vanskelige å lære og fordi stormaktene ikke kan bli enige om hvilket språk man skal bruke.

Latin ble brukt som verdensspråk i flere hundre år, men det har mistet kontakten

med det praktiske liv. — Den svenske språkmann, professor Bjørn Collinder ved Uppsala Universitet, belyser det internasjonale språkproblemet slik:

«Vad vi behöver är ett förenklat latin, ett rationellt, enkelt språk, som bevarar det latinsk-grekiska ordförrådet, som redan är internationellt, och som samtidigt är så enkelt och regelbundet, att var och en kan lära sig detsamma redan i folkskolan. Lyckligtvis har vi ett sådant språk: ESPERANTO.»

ESPERANTO ER LETT OG INTERNASJONALT

Esperanto er det logiske svaret på språkspørsmålet. Det er et vitenskapelig formet internasjonalt språk, bygget opp av elementer fra våre store kulturspråk. Det er så enkelt at det kan læres på en brøkdelen av den tid man trenger for å lære et nasjonalspråk.

Ordforrådet er så internasjonalt at man sraks kjenner igjen en stor del av ordene (telefon, bilde, apparat). Et system av for- og etterstavelser gjør det mulig å danne et stort antall nye ord av noen få tusen rotord. På norsk har vi f. eks. ordene varm, lunken, het, kald, kjølig, som må læres hver for seg. På Esperanto er alle beslektede ord dannet av én og samme ordstamme, slik at antall ord som virkelig må læres, reduseres til et minimum. Eksempel: *varma* (varm), *varmeta* (lunken), *varmega* (het), *malvarma* (kald), *malvarmeta* (kjølig).

LETTE UTTALEREGLER

Hvert ord i Esperanto uttales som det skrives og skrives som det uttales. Det finnes ikke «stumme» bokstaver, som på norsk og andre nasjonalspråk. I ord på mer enn én stavelse faller trykket på nest siste stavelse, f. eks. *banano*, *profesoro*, *Ameriko*, *familio*. Hver eneste av språkets 28 bokstaver har sin bestemte lyd. De fleste bokstavene uttales som på norsk. Siden enkelte bokstaver uttales litt forskjellig i de enkelte ord på norsk, skal man særlig merke at *o* uttales som i «godt» og *u* som i «tung». Bokstaver som ikke brukes i norske ord: *c* uttales «ts» som i «sats», *ĉ* «tj» som i «tjekkisk», *ĝ* «dsj» (stemt) som i «gin», *ĵ* summende «sj» som i fransk «journal», *ĝ* «skj» som i «skjold», *z* er en summende s.

ENKEL GRAMATIKK

Esperantos grammatikk består av enkle regler uten unntagelser.

Alle substantiver har endelsen *-o*: *kato* (katt). Adjektivene har endelsen *-a*: *varma* (varm), *granda* (stor), *rapida* (hurtig), *malrapida* (langsom). Adverbier dannes med endelsen *-e*: *rapide* (hurtig), *malrapide* (langsomt). Alle verbene har faste endelser for tider og former:

- i*: trinki (å drikke)
- as*: trinkas (drikker)
- is*: trinkis (drakk)
- os*: trinkos (skal drikke)
- u*: trinku! (drikk!).

Noen pronomen: *mi* (jeg), *vi* (du, De, dere), *li* (han), *ŝi* (hun), *ili* (de). Det er bare én bestemt artikkel: *la*. Ubestemt artikkel fins ikke. Oversett nå: *La granda kato trinkas rapide*.

HVORDAN SER ESPERANTO UT?

Prøv selv hva De kan forstå før De har lært noe! (Betoningen skal alltid være på nest siste stavelse):

Inteligenta persono lernas rapide la internacian lingvon Esperanto. Esperanto estas la moderna, kultura lingvo por la tuta mondo kaj la praktika solvo de la lingva problemo.

Muziko havas internacian karakteron. Muzik-notoj estas formo de internacia lingvo. Violono kaj piano estas muzik-instrumentoj.

Hundo kaj kato ne estas amikoj. Granito estas ŝtono. La vintro ne estas varma.

Tabako estas natura produkto. Mi havas

grandan cigaron. Si havas ringon sur la fingro. La prezidanto prezentis la financan raporton al la direktoroj de la industria kompanio.

(Selvsagt er ikke alle ordene i Esperanto så lik de tilsvarende ordene på norsk, som i disse eksemplene!)

LITT OM ESPERANTOS HISTORIE

Esperanto ble offentliggjort i 1887 av dr. L. L. Zamenhof, Warszawa. Han gav ut sin lille bok under pseudonymet *Doktoro Esperanto* («Esperanto» betyr håpende). Esperanto ble siden navnet på språket selv. Det vakte stor interesse i en rekke land, og snart ble de første Esperanto-foreninger stiftet og den første Esperanto-avis trykt. Det varte ikke lenge før Esperanto var i bruk i alle verdensdeler.

Det ble holdt kurser, foreninger ble stiftet i stadig flere land, og det utkom flere og flere aviser og tidsskrifter på Esperanto. I 1905 holdt esperantistene sin første verdenskongress. Utviklingen har fortsatt, bare hemmet av to verdenskriger. — Hittil har millioner lært Esperanto. Verden over brukes det som internasjonalt språk og formidler kontakt over landegrensene innen de mest forskjellige fagområder og interesseområder.

ET LEVENDE INTERNASJONALT SPRÅK

Esperanto er blitt det levende internasjonale språk som verden trenger. Det er ikke lenger et prosjekt, men et ferdig språk som har stått sin prøve. Det har allerede lenge av foregangsfolk vært brukt i kulturens og det praktiske livs tjeneste.

Tusener av bøker er utgitt på og om Esperanto, både originale og oversatte verker. Litteraturen omfatter dikt, skuespill, romaner, vitenskap, kunst, religion, politikk, teknikk etc. Det utkommer nå ca. 100 blad og tidsskrifter på Esperanto.

I radio er det regelmessige sendinger på Esperanto fra en rekke land, deriblant Brasil, Bulgaria, Italia, Jugoslavia, Spania, Schweiz, Polen Østerrike.

Esperanto brukes ved internasjonale kongresser, ved varemesser, i internasjonalt handelssamkvem, i reiselivet osv.

KORRESPONDANSE OG REISER

Mange har stor glede og nytte av Esperanto i brevveksling med mennesker i andre

land. Det kan være en vennskapelig utveksling av tanker, hvor man forteller om sitt liv og levevilkårene i sitt land, eller det kan dreie seg om tekniske problemer av felles interesse. I skolene blir internasjonal brevveksling en oppmuntring for elevene.

En forutseende turist som har lært seg Esperanto, er ikke henvist til en mer eller mindre vellykket kontakt med bærere, konduktører, portier og guider. Esperantistenes Verdensforbund (Universala Esperanto-Asocio) har opprettet et system av «delegater» (en slags «Esperanto-konsulere») på en mengde steder rundt i verden. Adressene til delegatene finnes i forbundets årbok. Har man på forhånd skrevet til delegater på de steder man skal besøke, møter vedkommende opp og gir den bistand man har bruk for. Slik kan turistene møte mennesker med samme interesser som de selv har — mennesker som ikke virker fremmede, fordi språket er felles. Nær 3500 slike delegater står idag til tjeneste, og ikke bare for turister — man kan også skrive til dem når man ønsker opplysninger om ett eller annet i et fremmed land.

ESPERANTO — FN — UNESCO

I 1950 fikk FN overlevert en henvendelse fra 17 millioner mennesker i alle verdensdeler om å ta opp spørsmålet og medvirke til å utbre bruken av Esperanto. Blant dem som hadde undertegnet henvendelsen var Vincent Auriol (Frankrikes president), Willem Drees (Nederlands statsminister) og Josef Cyrankiewicz (Polens statsminister).

TIL KURSER OG SELVSTUDIUM

«Systematisk kurs i Esperanto»

av Seppik og Malmgren (kr. 4,00)

«Nøkkel til Esperanto»

(kr. 0,75)

Hos bokhandleren eller i postoppkrav fra

ESPERANTOFORLAGET A/S

Boks 842, Oslo 1 - Postgiro: 100.31

Det ble overlatt UNESCO (FN's organisasjon for utdannelse, vitenskap og kultur) å behandle henvendelse. I 1954 vedtok UNESCO's generalkonferanse i Montevideo en resolusjon som fastslår at de resultater Esperanto-bevegelsen har nådd, helt ut svarer til UNESCO's formål, og at UNESCO vil holde seg å jour med Esperanto-arbeidet. Samtidig ble Universala Esperanto-Asocio anerkjent som rådgivende organ for UNESCO.

En ny henvendelse om Esperanto ble overlevert FN i 1966 i sammenheng med året for internasjonalt samarbeide, denne gang på vegne av over 74 millioner mennesker i alle verdensdeler. Blant nordmenn som hadde undertegnet denne henvendelsen, var statsminister Per Borten, en rekke regjeringsmedlemmer og et betydelig antall stortingsrepresentanter. Landsorganisasjonen i Norge var blant de 4000 organisasjoner som sluttet seg til henvendelsen. — Fortegnelsen over dem som har underskrevet henvendelsen, viser at tanken om et internasjonalt språk har trengt inn på alle områder av samfunnslivet og stadig får øket tilslutning.

ESPERANTO I SKOLENE

I stadig flere land blir det gjort forsøk med Esperanto-undervisning i skolen, og antallet skoler som innfører Esperanto som fag på timeplanen, øker stadig. Også i Norge har det vært forsøksundervisning i Esperanto, ved gymnasier i Oslo og Sarpsborg.

Særlig de blinde har i høy grad innsatt hvilket verdifullt hjelpemiddel Esperanto er for internasjonal kontakt, og Esperanto undervises ved svært mange av blindeskolene i verden, også ved de norske.

Forsøk som har vært gjort bl. a. i England og Finnland, viser at elever som lærer Esperanto som første fremmede språk, ganske snart kommer så langt at de kan begynne å bruke sine kunnskaper. Dette gir elevene tro på at de kan lære å mestre fremmede språk og større mot på å gå i gang med de vanskeligere nasjonalspråkene. Esperanto er altså et ypperlig grunnlag for studiet av andre fremmede språk.

HVA DE KAN GJØRE

Esperanto er allerede idag til stor nytte på mange områder. Det kan utrette meget mer hvis flere mennesker lærer språket og hjelper til med å utbre det. Esperanto-bevegelsen er ennå på mange måter på

De behøver ikke å vente på at
«noen skal sette noe i gang»!

5 store studiebreve kr. 23,00

Rabatt for studieringer

Skriv etter opplysninger

BREVKURS

NORSK ESPERANTOFORBUND
(Afdeling for Brevundervisning)

Postgirokonto 100.33

Boks 942, Oslo 1

pionérstadiet og trenger interesserte medarbeidere.

De kan lære Esperanto ved selvstudium eller ved ett av de kurser som hvert år holdes ruddt om i landet av Esperanto-foreningene og Friundervisningen. Studerer De på egen hånd, vil De ha god nytte av brevkurset.

De har ikke holdt på lenge før De kan begynne å bruke språket på områder som interesserer Dem. De vil snart oppdage at De har meget igjen for det.

Forteller De andre om Esperanto, eller danner De en studiering, kan De bidra til Esperanto-bevegelsens arbeide for internasjonal forståelse.

«*Esperanto*, n. — Fr. *Esperanto*, pseudonym of Dr. Lazarus Ludwig Zamenhof (1859—1917), inventor of this language, fr. Sp. *esperanza*, 'hope', fr. *esperar*, 'to hope', fr. L. *sperare*. See *despair* and *-ance*. Derivatives: *Esperant-ic*, adj., *Esperant-ism*, n., *Esperant-ist*, n and adj.»

El la leksikono oni ankaŭ povos kapti ideon pri la vera internaciismo de la Internacia Lingvo. Inter alie ni lernas, ke nia vorto *esii* estas vere internacia: latine *esse*, el hindeŭropa radiko **es-*, el kiu ankaŭ malnovhinda *ásmo*, hetita *esmi*, armena *em*, greka, albana *jam*, malnovslava *jesmi*, litova *esmi*, malnovirlanda *am*, gota *im*, malnovangla *eom*, *eam*, *am*, ktp. Kaj la aŭtoro sendas nin por novaj komparoj al aliaj vortoj: absence, essence, interest, presence, prospect.

La nura trafiliumado estas granda plezuro, studo kompreneble eĉ multe pli granda plezuro.

JHR.

BELA ROMANETO

Margid Thoræus-Ekstrøm: Brilo de Fantomo, Originala romaneto. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj — 1967. 72 p. broŝ. Prezo: 7,50 danaj kronoj.

Vi ne enuos legante ĉi tiun libron, tiel konstatas la eldonisto. Kaj vere, la romaneto estas legebla, eĉ leginda. Antaŭ ĉio mi deziras komplimenti la aŭtorinon pro la bela kaj flua Esperanto, kiun ŝi skribas. La libro estas lingve kontrolita de la Literatura Komitato de SAT, sed oni ne evitis strangan eraron: «Mi memoras ŝin, staranta», (kelkajn paĝojn poste tute ĝuste: kolombojn, manĝantajn). Plie: «Unu kiel vi oni nur povas kisi». Kaj en la frazo «Mi pensas multe, tie mi staris» oni aŭdas la reĉhon de la sveda «där jag stod». Supozeble tiuj estas la plej gravaj makuloj, do: nenio!

Legante la libreton, oni havas — almenaŭ en la unua duono, kiu estas multe pli forta ol la dua — la impreson, ke la aŭtorino mem travivis tion, kion ŝi rakontas, kaj ke tio donas vivon al la rakonto, same kiel al la lingvaĵo.

Oni povas facile rekomendi la libron al nia leganta publiko; la prezo kaj la amplekso ambaŭ estas moderaj.

JHR.

Vilho Setälä — Ebbe Vilborg
C. Stöp-Bowitz:

ESPERANTO — MODERNA
LINGVO,

kun antaŭparolo de
prof. W. E. Collinson.

Teoria studo de la demando pri la pasivaj participoj surbaze de Fundamento de Esperanto. Neŭtrale prezentas ambaŭ vidpunktojn. Nemalhavebla por ĉiu lingve interesata esperantisto.

Prezo: kr. 9,00.

ESPERANTOFORLAGET A/S,
Boks 942, Oslo 1,
poŝtgirokonto 100.31.

TEO JUNG — 75-JARA

La fondinto kaj multjara redaktoro de «Heroldo de Esperanto», verkanto, Akademiano, aktivulo, estas 75-jara la 21-an de decembro. Li estas ankoraŭ same aktiva, li ĵus eldonis scienca gramatikan studon, kium ni recenzas en ĉi tiu numero. Dezirante al Jung ankoraŭ multajn riĉajn jarojn, ni kore bondeziras.

HANS JAKOB

la 4-an de oktobro mortis Hans Jakob, en la aĝo de 76 jaroj. Li estis redaktoro de «Esperanto» 1947—1955 kaj redaktoro de la Jarlibro 1921—1940.

FRANZ STEIN

Meze de septembro mortis, dum liber-tempo en Italujo, la ĉefurbestro de Mainz, Franz Stein, prezidanto de LKK de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Geografiaj nomoj - -

certa internacia graveco, dum la ceteraj estos esperantigataj laŭgrade, laŭ bezono. 2) La landnomoj sekvos ĝenerale la principojn starigitajn de d-ro Zamenhof: dividado en radikoj geografiaj, kaj radikoj gentaj, kun sufikso -uj. Tamen, pro ŝanĝitaj cirkonstancoj, tiuj ĉi principoj ne estu rigidaj, sed sufiĉe liberalaj, tiel ke ili permesu la individuan konsideron de ĉiu unuopa kazo, surbaze de la inter-

nacia uzo, jam akceptita uzo en Esperanto, kaj la deziro de la landanoj mem. Tiel malfermiĝas larĝa ebleco al la individua nomigo de la landoj, sen necesa enkadrigo en fiksaĵn regulojn.

El tiuj ĉi bazaj principoj tuj evidentiĝas pluraj fundamentaj reguloj. Antaŭ ĉio oni notu, ke ne temas pri ia transskribo de nomoj, sed pri ESPERANTIGO. Do, ĉiu nomo devas esti Esperanta substantivo aŭ eventuale substantivo kun adjektivo, deklinaciebla en Esperanto. Krome, la Esperanta alfabeto devas sufiĉi por ĉiuj nomoj, sen aldono de literoj pruntitaj el aliaj alfabetoj.

Tiel ekzemple Borneo, Luzono, Jamajko, Uralo, Tibeto, Gobio Gorĝtaŭno.

Kie la internacia kutimo estas tradukado de nomoj, ankaŭ en Esperanto la principo estas sekvi: Ruĝa Maro, Flava Maro, Suda Oceano, aŭ kie la jam akceptita uzo tion aprobis: Novjorko, Bonaero.

Kiam ajn estis eble, ni kunigis plurajn partojn de nomo en unusolan, eĉ se per tio la origino de la nomo fariĝis nerekoncible, ĉar en tiaj kazoj ni tentis pli al la elparolo ol la skribmaniero kaj deveno. Ekzemple: Sangeorga Golfo, Malgrandantiloj Bonespera Kabo, Novzemljo, Sudgeorgio, Kenjamento, Paragvajrivero, Riodejaneiro, Kuala-lumpuro, Telavivo, Lorencomarko, Daresalamo, Orientĉina Maro, Novkaledonio, Makinlemonto.

Kiam kunmetita vorto estus tro longa, peza aŭ nekonvena por elparolo, ni dividis ĝin. Tiel: Salomonaj Insuloj, Franciozefaj Insuloj, Boliva Altebenajo, Indocina Duoninsulo, Grandaŭstralia Golfo. En tiuj kazoj ambaŭ vortoj estas skribataj majuskle. Nur eĉepte ni uzis ligstreketon: Saŭdi-arabio, Princlanstrid-bordo.

Koncerne landnomojn, same la urbonomojn, ni klopodis ke ili ĉiam estu reprezentataj per unusola vorto. Kiam la ĉefurbo havas la saman nomon kiel la lando, ni aldonis la vorton «urbo». Meksikurbo, Gvatemalurbo, aŭ -io al la lando, kiel Tunizo, Tunizio.

Eĉ se du formoj havis engalajn ŝancojn por esti akceptitaj kiel nomo de iu lando, ni nenie lasis duoblan uzon, ĉar en tiu kazo la haoso pludaŭrus. Tiel ekzemple ni preferis jenajn nomojn, inter du elekteblaj: Afganujo, Birmo, Ĉinujo, Koreo, Malajzio, Mongolujo, Vjetnamo, Cipro, Etiopio, Nigerio, Nigerio, Togolando, Tunizio, Voltao,

Esperanta filmo

Kunlaborante, Naturamika Societo Ujpest, la Hungara Esperanto Asocio kaj la Hungara Filmprodukta Entrepreno, en la jaro 1966, produktis normalmezuran dokument-filmon (nigra-blanka), kies temo estas Esperanto direkta. La titolo estas: Esperanto fonto. Ĝi pretiĝis por kinejoj.

La filmo parte parolas en hungara, aliparte en Esperanta lingvo. Ĉe la hungaraj detaloj ni aplikis esperantajn surskribojn, tielmaniere al la esperantistoj en ĉiuj partoj de la Mondo estas komprenebla. La filmo daŭras 17 minutojn.

P.S. Informe mi sciigas la adreson de la Hungara Filmkomerco: Hungarofilm, Buda-pest, V. Báthory u. 10.

kun respektplena saluto

dr. Paulus Alojzjo
reĝisoro

Julio Piller
fakgvidanto

Okcidentkongo, Orientkongo, Albanujo, Bel-
gujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio,
Danujo, Hungarujo, Finnujo, Rumanujo,
Polujo, Svisujo, Svedujo, Sovetio, Aŭstrujo.

Kiel oni vidas, ni ne klopodis konsekven-
ce sekvi la dezirojn de la fervoraj -ujo-istoj,
nek de la -io-istoj sed klopodis pesi la jam
akceptitan kutimon en Esperanto, la inter-
nacion rekoneblon, kaj la volon de la es-
perantistoj de la koncerna lando mem. En
tiu klopodo ie ni bone sukcesis, ie eble ne,
kaj tion la praktiko en la estonto montros.

La urbonomoj ĉiuj fariĝis unusola vorto,
enpremitaj en la Esperantan ortografion.
Tiel: Sanhuano, Gorĝtaŭno, Portospeno, San-
hoseo, Sanfrancisko, Kajenurbo, Pnompino,
Fortlamio, Adisabebo, Sanmarinurbo.

Koncerne la loĝantojn de la landoj nenio
ŝanĝiĝis: nederlandano, finno, ugandano,
meksikano. De la landnomoj kiuj finiĝas je
«io», somaliano, tuniziano, boliviano, mali-
ano, zambiano, sed jugoslavo, ĉeĥo kaj slo-
vako.

Esperanta maparo kun ĉiuj nomoj estas
jam en preparo. Per tio la Komisiono por
Ordigo de Geografiaj Nomoj transdonos la
rezulton de sia okjara laboro al la publiko.
Ni mem konscias, ke la atingita listo ne
estas senmanka, sed la laboro pri kunordi-
gado de diversaj foje tute kontraŭaj deziroj,
ofte estis neebla.

Kiel jam dirite, ni invitos la publikon uzi

53-a Universala Kongreso de Esperanto Madrid, 3.-10. Augusto 1968

Alta Protektanto: Ĉefgeneralato Francisco
Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Binnenweg 176, Rotter-
dam, Nederlando.

Limdato. Ni atentigas ke la aliĝoj estas
akceptataj ĝis la 25-an de junio 1968. Ali-
ĝiloj, kiuj atingos la kongresajn perantojn
aŭ la konstantan adreson post tiu dato, ne
estos traktitaj.

Infana Kongreseto. Samtempe kun la Uni-
versala Kongreso okazos la 11-a Internacia
Infana Kongreseto. Rajtas partopreni infanoj
de 6 ĝis 13-jaraĝaj. La kotizo, kiu inkluzivas
ĉiujn kostojn dum la tuta semajno, estas
45,00 ned.gld. Informoj kaj aliĝiloj estas
riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kon-
greso.

Ekskursoj. La Loka Kongresa Komitato
antaŭvidas tuttagajn ekskursojn al Escorial,
Segovia kaj Toledo. Kvintaga Postkongreso
okazos en Zaragoza. Detaloj aperos en ven-
nontaj oficialaj komunikoj kaj en la Dua
Bulteno.

Arta Festivalo. Artistaj grupoj aŭ indi-
viduoj, kiuj deziras partopreni en la pro-
gramo, povas sin anonci ĉe la konstanta
adreso ĝis la 1-a de januaro 1968. Por ke
L.K.K. povu decidi pri la sinproponoj, nece-
sas ke al ili estu aldonitaj rekomendoj de

la nomojn fiksitajn de la Komisiono dum
tri-kvar jaroj, kaj kritiku ilin ĉefe nur kiam
iu nomo montriĝos evidente praktike neuze-
bla. Ĉar se ni ĉiuj nun tuj akre kritikos
ĉion kio al ni ne plaĉas, pri preskaŭ iu
nomo alvenos tiom da kontraŭaj opinioj,
ke ni simple devos forĵeti la rezulton de la
laboro, kaj komenci de la komenco, por
alveni al novaj rezultoj, kiuj siavice estos
same akre kritikataj. Neniam tio finiĝos.

Tial ni simple rekomendas, elprovi uzi
tiun ĉi nomaron en la praktika vivo, kun
grandanima toleremo al iu aŭ alia nomo, kiu
kontraŭas nian guston.

Ĉar nur la praktiko povas esti la fina ar-
bitro en tiu ĉi grava demando.

Tibor Sekelj.

kompetentaj personoj aŭ instancoj kaj kon-
kretaj pruvoj pri la nivelo de la sinproponin-
toj.

Aliĝkotoj. Ekde la 1-a de jan. 1968 vali-
das la jenaj kotoj: Kongresano 77,00 gld.
Junulo ĝis 20-jara 23,00 gld. Edz(in)o 33,50
gld. Univ.Studento 38,50 gld. Blindulo 31,00
gld.

Individua Membro de U.E.A., kiu ricevas
la Jarlibron kaj la Revuon «Esperanto» raj-
tas rabaton de 20,00 gld. Tiu ĉi rabato vali-
das nur por la kategorio «Kongresano».

Enirvizoj. La oficialaj instancoj en His-
panujo garantiis al LKK ke enirvizoj estos
donitaj sen distingo pri la landoj el kiuj
venas la kongresanoj.

Fervoja rabato. Kun la Dua Bulteno ĉiu
aliĝinto ricevos specialan rabaton, per kiu,
prezentante ĝin je aĉeto de revenbileto fer-
voja al Madrid, oni ĝuos rabaton ĉe la his-
pana fervojo kaj ĉe preskaŭ ĉiuj trajotaj
landoj. Detalaj klarigoj akompanos la raba-
tilon.

Dua Bulteno. En januaro 1968 ĉiu aliĝinto
ricevos la Duan Oficialan Bultenon, kiu en-
havas ĉiujn necesajn informojn koncerne
loĝadon, ekskursojn, k.t.p.

Arta Festivalo. Artistaj grupoj aŭ indivi-
duoj, kiuj deziras partopreni en la pro-
gramo de la 4-a Internacia Arta Festivalo,
povas sin anonci ĉe la konstanta adreso ĝis
la 15-a de januaro 1968. Por ke L.K.K.
povu decidi pri la sinproponoj, necesas ke ili
estu akompanataj de rekomendoj de kom-
petentaj personoj aŭ instancoj kaj de kon-
kretaj pruvoj pri la nivelo de la sinpropo-
nintoj.

Statistiko. Arg. 1, Aŭstralio 1, Aŭstr. 1,
Belg. 10, Braz. 2, Brit. 19, Bulg. 10, Ĉeĥ.
1, Danl. 5, Finnl. 4, Franc. 30, Germ. 10,
Grek. 1, Hisp. 28, Hung. 7, Ital. 10, Jap. 3,
Jug. 14, Kan. 3, Meks. 1, Mon. 1, Ned. 17,
Norv. 3, Nov-Zel. 1, Pol. 8, Port. 2, Sved.
13, Svis. 2, Usono 8, Entute 216 kongresa-
noj el 29 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario.



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIOTO — NEFA
Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22,
Oslo 9

«Tertitten» denove veturas

«Tertitten estis la moknomo de la iama Urskog — Høland-fervojo inter Sørumsand kaj Skulerud. La unua parto de tiu-ĉi fervojo al Bjørkelangen estis malfermita en 1896 kaj du jarojn poste ĝi estis plilongita al Skulerud.

La moknomo «Tertitten», kio fakte samtempe estis karesnomo, estis kreita de la publika humoro per aliformado de la tiam en la norvega lingvo multe uzita esprimo «tertiærbane», t.e. triaranga fervojo. La ŝpuro estis nur 75 centrimetrojn kaj la Urskog — Høland-fervojo estis la plej etŝpura iam funkciigita en Norvegio.

Malgraŭ tio ĝi dum pli ol duona jarcento fidele kaj bone servis la distriktojn, tra kiuj ĝi kondukis. La ĉefproduktoj transportitaj estis ligno kaj trunkaro, kaj oni


fakte povas diri ke estis la Urskog — Høland-fervojo kio ebligis la ekspluatadon de la vastaj arbaregoj de la distrikto kaj tiel grave kontribuis al ĝia ekonomia evoluo.

Sed fine ĝi mem distanciĝis de la evoluo. Novaj transportiloj transprenis pli kaj pli de la trafiko kaj en 1960 la funkciado ĉesis.

*

Sed jam en 1961 kelkaj fervojentuziasmoj fondis hobian klubon «A/S Hølandsbanen», kies celo estis refunkciigi parton de la Urskog — Høland-fervojo kiel hobia kaj turista fervojo. Ili transprenis du lokomotivojn, kelkajn pasaĝer- kaj varvagonojn kaj kun granda fervoro komencis la laboron.

Kaj ili sukcesis. Ĉiun dimanĉon nun denove la malnovaj lokomotivoj «Setskogen» kaj



Filatelo proksimigas la homojn de ĉiuj landoj

III Filatela Konkurso de la Pola Radio,
organizata kun la partopreno de la
Pola Filatelista Asocio

1000 PREMIOJ

La kondiĉoj de la Konkurso. Oni devas respondi al tri al la subaj ses demandoj:

1. Menciŭ la nomojn /antaŭnomojn/ de tri personoj lokitaj en la serioj «Grandaj poloj», per unu vorto difinante ilian agadon /sciencisto, verkisto ktp/, emisiitaj en la jaroj 1961, 1962, 1963.
2. Difinu la ĉefan elementon de la desegno de la du vertikalaj poŝtmarkoj el la serioj dediĉitaj al la polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj, emisiitaj en la 1961 kaj 1962 jaroj.
3. Menciŭ tri monumentojn prezentitajn en la serio «Monumentoj de Varsovio», emisiita en 1955 kaj kompletigita en 1956.
4. La bildoj de kiuj pentristoj estas reproduktitaj sur la poŝtmarkoj el la serio «Pola pentroarto», emisiita en la jaro 1959.
5. Kion prezentas la poŝtmarkoj kun la plej granda nominala valoro en la serioj dediĉitaj al la 5-jaro, 10-jaro kaj 15-jaro de Popola Pollando.
6. Menciŭ tri urbojn, prezentitajn en la serio «Historiaj urboj de Pollando», emisiita en la jaroj 1960—1961.

La partoprenantoj de la Konkurso, kiuj trafe respondos al tri el inter la ses deman-

doj, partoprenos lotadon de 1000 premioj en la formo de unuavice senpagaj ambaŭflankaj vojaĝoj por 10-taga estado en Pollando inkluzive atrakcian ekskurson tra nia lando, de klaskajeroj kun polaj poŝtmarkoj, kompletoj da kovertoj de la unua tago de la cirkulado, jaraj abonoj de la polaj poŝtmarkoj, filatelaj eldonaĵoj, ilustritaj albumoj, diskoj kun polaj popolaj kaj simfoniaj muzikverkoj kaj elfaraĵoj de la pola popola arto.

La partoprenantoj de la Konkurso, kiuj trafe respondos al ĉiuj ses demandoj, partoprenos lotadon de aldonaĵ filatelaj premioj fonditaj de: Pola Filatelista Asocio. Ŝtata Filatela Entrepreno, Entrepreno por la Importo kaj Eksporto «Ruch», redakcio de la dusemajna revuo «Filatelista».

Respondojn al la Konkurso oni devas sendi al la adreso: Pola Radio, Varsovio, Box 46, Pollando — ĝis la 15 de decembro 1967. Decidos la dato de la poŝta stampo. Oni rajtas sendi plurajn respondojn al la konkursaj demandoj, sed ĉion trion /aŭ pli/ da respondoj sur aparta afrankita poŝtkarto aŭ en aparta afrankita letero.

La ĵurio, al kies konsisto apartenas reprezentantoj de la Pola Radio kaj Pola Filatelista Asocio, anoncos la rezultojn de la Konkurso sur la antenoj de la Pola Radio la 15-an kaj 16-an de januaro 1968.

La polajn poŝtmarkojn oni povas aboni en la filatelaj vendejoj de la tuta mondo.

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

La Urso Sarpsborg

12/10. La Urso kunvenis en la hejmo de ge-sroj Forsberg. Ni ekhavis raporton de kunveno en Oslo kiun du klubanoj vizitis. (5/10). Krom klubaj aferoj tre interesa programero estis: Kunmeto de komencliteroj kiun s-ino Forsberg lerte kompilis el muzik-programo. Ni ofte vizitas ilian hejmon. Kaj ĉiufoje ni estas bone regalataj.

La Urso, Sarpsborg kunvenis 26/10. Oni diskutis pri la Esperantokurso en «Sarpem» kaj la utiligo de tio, kaj ankaŭ pri la Urba

«Høland»tiras la originalajn malnovajn vagonojn sur la tri kilometrojn longa linio de Fyen ĉe Sørumsand laŭlonge Glomma al Bingsfoss.

La fervojo ankaŭ estas malfermita por la publiko kaj ni varme rekomendas al ĉiuj, kiuj deziras travivi denove la romantikon de la vaporfervoja epoko, rezervi dimanĉon dum la venonta somero por vizito al la «Hølandsfervojo» ĉe Sørumsand. La horaro publikigiĝos en «Rutebok for Norge».

Se vi deziras plurajn informojn pri la hobiofervojo, b. v. skribu al: A/L Hølandsbanen, Boks 31, Vinderen, Oslo 3.

Biblioteko, kiu estas ĉiam tre afabla al ni. Ĉiujare la klubo sendas al la Biblioteko liston kun rekomendoj pri aĉetota Esperanta literaturo, kaj ĉiujare la Biblioteko aĉetas ĉiujn rekomenditajn librojn. La Biblioteko tial nun posedas 58 Esperantajn librojn plus 19, kiujn la prezidanto ĵus donacis.

Post instruado kaj ellotado laŭ bildkarta metodo la prezidanto montris lumbildojn pri vojaĝo de la Balta Maro al la baroka palaco en Ludwigsburg.

La tri verdaj steloj de Løten.

Marde la 24an de oktobro, la tago de UN, la klubo La tri verdaj steloj de Løten aranĝis sian unuan kunvenon post la somerferio. Bedaŭrinde la klubo perdis du aktivulojn, nome gesinjoroj Gunvor kaj Per Engen, kiuj en la jaro transloĝiĝis al Drammen.

Nun ni fariĝis nur 5 personoj en la klubo, sed malnova proverbo diras: «Kiam la mize-ro, estas plej granda, tiam la helpo estas ankaŭ proksime.»

Nia juna aktivulo Øyvind Kverneng stariĝis kurson por komencantoj, kaj nun 6 personoj studas Esperanton ĉiun mardvesperon en la popola biblioteko en Løten, sub gvidado de Øyvind Kverneng.

Dum la kunveno la 24an de oktobro partoprenis la 5 membroj de la klubo, kaj ankaŭ la 6 gekursanoj.

La prezidanto unue bonvenigis ilin, kaj rakontis pri la intima kontakto inter UN kaj la Esperantomovado.

Daŭre li instigis ilin fariĝi aktivaj esperantistoj, kaj ke ili aliĝu al la movado.

Ĉiuj 6, plejparte tre junaj, aliĝis, kaj feliĉe la membronombro kreskis de 5 al 11 membroj.

Fine la prezidanto montris sian lumbildserion pri la 19a kongreso de IFEF en Fulda, kaj pri la Germana Esperantokongreso en Hamburgo kie li partoprenis.

Kun novaj junaj kaj freŝaj fortoj ni antaŭvidas la estontecon de nia klubo kun optimismo.

Per Johan Krogstie.

Klubo Esperantista en Oslo.

7/9.67. La vizprez. Thor Magnus Carlsen malfermis la kunvenon kaj deziris bonvenon al nova laborsezono.

Ni komencis per komuna kantado de «La Espero» laŭ akompano per piano de Marit Delor.

Ludvig Anjer raportis pri la 52-a Univer-sala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. Estas la sola U.E.A. kongreso kiu havas nomon de du urboj (Tel Avis/Rotterdam). La kongresejo troviĝis en la plej granda koncertejo en Eŭropo «de Doelen», tre centre situata, kio ankaŭ kontribuis al la granda sukceso de la kongreso. Li rakontis pri la diversaj kunvenoj kaj aliaj aranĝoj. Dum la solena malfermo L. Anjer salutis de la norvega registaro kaj Olav Thormodsen el Haugesund de N.E.L. La prez. de U.E.A. Ivo Lapenna festparoladis. La kutima kantado de «La Espero» je la fino de la inaŭguro ne okazis. Al la oficiala akcepto en la urbo-domo ĉiuj partoprenantoj de la kongreso estis invititaj. En belega vetero okazis du tut-tagaj ekskursoj. Nur 4 norvegoj partoprenis la kongreson en Rotterdam, kaj L. Anjer finis per admono al la klubanoj multnombre aliĝi al la venontjara kongreso en Madrid.

Post la prelego L. Anjer montris multajn belegajn kolorlumbildojn — ne nur de la lasta kongreso, sed ankaŭ kelkajn de la kongreso en Budapeŝto.

18/9.67. La prez. John Berggren bonvenigis al la kunveno — kaj precipe niajn usonajn gastojn Phyllis kaj Joel Silverman.

Rilate al la internacia kongreso de Mond-federalistoj en Oslo la prez. informis ke junulaj membroj de la japana delegacio prezentis proponon al la kongreso pri uzo de Esperanto kiel oficiala lingvo, sed la propono ne estis bone akceptata ĉar la angla lingvo ja estas la oficiala lingvo de la organizo. Tamen, la propono havis sian propagandan valoron ĉar junuloj de «En Verden» en Oslo petis informojn pri Esperanto.

Ĉar John Berggreen ne ĉestis la klubkunvenon 7/9 li nun legis sian numeron de la klubo gabeto «La Vagabondo». Ĝi estis tre bone redaktita kaj entenis interalie superrigardon pri la kluba laboro, pri la multaj lingvoj ekzistantaj kaj humuraĵojn.

Otto Prytz rakontis pri la Seminario por blindaj esperantistoj en Rheinbreitbach, kun sonbildo.

Rolf Bugge Paulsen diris memorigajn vortojn pri Joseph R. Scherer el Usono, kiu forpasis la 20-an de Julio. S. Scherer vizitis ankaŭ Norvegiujn dum sia mondvojaĝo inter la du mondmilitoj.

Dum la kafopaŭzo la prez. klarigis pri la nova programserio «Vi demandas — La kompetentuloj respondas», kaj petis la klu-

banojn pripensi la aferon kaj prezenti demandojn dum venontaj kunvenoj.

Raportis Harda Danielsen.

5/10.67. La prez. John Berggren bonvenigis la ĉestantojn, kaj precipe niajn gastojn: 3 hungarojn — Egön Vasarhelyi, Laszlo Gaspar kaj Zoltan Gaspar; Randolf Grotmål; Karsten Langsholt el Sarpsborg kaj nian hodiaŭan prelegonton Johan Hammond Rosback, ankaŭ el Sarpsborg, kiu ankaŭ estas ano de la klubo.

L. Anjer legis norveglingve la lastan presnovaĵon «Henvendelse fra 73 millioner venter i FN-sekretariatet.»

Johan Hammond Rosbach prezentis lumbildprelegon «Eŭropa kalejdoskopo». Per tre belaj kolorlumbildoj kaj komentarioj li gvidis nin en multaj diversaj belaj kaj interesaj lokoj, sed tamen, la plej ĉarma kaj bela parto de lia prezentado estis la lasta kiam li recitis sian memverkitan poemon akompanatan de bildoj de nia lando. Tio estis vera travivaĵo. La prez. dankis kaj petis lin transdoni niajn plej korajn salutojn al la klubo en Sarpsborg.

16/10.67. La 22/10 estas la oficiala tago de U.N. La prez. proponis sendi telegramon al la ĝenerala sekretario de U.N., kio estis unuanime aprobata.

Ĉar Thor Magnus Carlsen forestis pro militservo, la anoncita kafo-demonstracio devis prokrastiĝi. Anstataŭe, la prez. — pro diversaj demandoj ricevitaj — estis petinta al C. Stop-Bowitz klarigi iom pri aspektoj kaj tempoj. Li prezentis la lingvo-historian evoluon de la fenomenoj kaj donis diversajn ekzemplojn, norvegajn kaj esperantajn.

Sekvis pakaŭkcio, tre lerte kaj efike gvidata de Kjell Gustavsen, kiu montras la bonegan rezulton de kr. 125,00. Ĉiuj aŭkciobjektoj estis donacoj de la ĉestantoj.

Ĉar kelkaj membroj kunportis tukojn, florojn, kandelojn, kandelingojn k.t.p., ni ĝuis la kafon kaj kukojn en agrabla etoso.

Raportis Harda Danielsen.

La Esperantoklubo de Bergen.

Ni kunvenis 12/10 en la hejmo de ges-roj Leonora kaj Kr. Sivertsen.

La prez. sino Elsa Værnor malfermis kaj transdonis la vorton al ges.oj Sivertsen kiuj

prenis sur sin la programan respondecon. Unue oni aŭdis per sonbendo la radio-intervjuon de John Berggren, kiu estis tre interesa.

Sekvis la tasko de la vespero kiu estis: «Tra nia kantlibro. Malfacilaj vortoj de kantoj.» La ĉestantoj asistis unu la alian por trovi la vortojn norveglingvajn. Plua tasko estis konstrui frazojn — esperantlingve — kaj uzi la vortojn. Ĉiuj laŭlegis sian produkton. Poste oni aŭdis la tuton per sonbendo. Tiel ĉiuj povis prijuĝi sin mem kaj la aliajn.

La prez. laŭlegis la septembran cirkuleron de N.E.L. La jarfesto estis diskutata, kaj ĉiuj anoncis sin. Poste, kantado, interparolado kaj kafotablo.

Ĉestis 15.

J. J.

Kristiansands Esperantoklubb.

19/10. Projekta babilado pri lernanto kaj membro-varbado. Tiam Birger ekhavis bonan ideon. Dum mezo de la tagmezuna ideo, mi eltrovis, ke ni bezonis ankaŭ mangaĵojn. Dum la mangado, muzika ideo naturiĝis en ni. Kaj kun kaf-gusto kaj paneto en la buŝo, ni stariĝis, kaj Birger kondukis muzikan konkurson. Konkludo: Babila homo-kaptaĵo kaj muzika ideo.

KRISTNASKA LUDKANTO

Bonvenon, verda kaj brila abi' kun lumo de la kristnaskkandelo, kun flagrubandoj kaj multe pli — en pinto brilas la bela stelo.

Per sia brilo pri Dia Filo rakontas ĝi.

L'unuan fojon la kara Di' en fremda lando per stel-apero informis iam al ĉiuj ni, ke sian Filon Li sendis al tero.

Sub tiu stelo tuj la anĝelo salutis Lin.

Pri Jesueto rakontis patrin multfoje hejmo en la vespero, per mildaj vortoj ni konas Lin, kaj ankaŭ pro la ordona severo.

Dum brilas stelo, pri la ĉielo rakontas arb'.

Trad.: *H. A. Rosbach.*

UNU PERSONO

En n-ro 8 ni informis pri nova gazeta kurso, kaj ni petis niajn legantojn pri simpla helpo. Ni petis, ke oni skribu al la ĉefredaktoro de la koncerna gazeto, montrante diversmaniere sian intereson.

Unu persono reagis. Unu persono skribis al la redaktoro.

Kaj efektive tiu unu persono tiel inteligente skribis, ke ŝia letero bone efikis.

Sed kie estas ĉiuj aliaj. Ĉu nenin bonvolus apogi la unusolan letterskribenton, la kursverkinton, la Esperanto-favoran ĉefredaktoron — kaj Esperanton?

Ni ankoraŭ petas, ke vi agu laŭ la konsiloj en n-ro 8, kaj kuraĝas esperi pri pozitiva rezulto.

Korespondu!

25-jara oficisto tre deziras korespondadon kun juna viro aŭ fraŭlino de via lando. Interesiĝas pri ĉio, kolektas Esperantajn revuojn. Gosbert Gehlert, 86 *Bamberg*, Weide 11, Germanujo.

Mi dezirus korespondi kun amikoj el via lando. Mi estas gimnaziano, 16-jara komencanto. Mi kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn kaj gramofondiskojn de BEAT-muziko. Mi ankaŭ tre interesiĝas pri lingvoj, kaj studas i.a. la norvegan. Suznjevic Vladimir, Zeleni dol A-7, *Zagreb*, Jugoslavio.

28-jara oficistino kaj ŝia 34-jara edzo deziras korespondi. Kolektas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, gramofondiskojn, monerojn k. c. S.ino L. Matulova, Srážná 8, *Jiblava*, Ĉeĥoslovakujo.

Mi volas korespondi kun norvegaj 19-21-jaraj fraŭlinoj aŭ fraŭloj. Mi estas 22-jara fraŭlo, lastjara studento en jura fakultato. Mi amas muzikon, operon, sporton kaj bildkartojn. Skribu al: Tikász Attila, *Berettyóújfalú*, Ságvári u. 4, sz., Hungarujo.

En Ĉeĥoslovakio deziras korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi spertojn kun la tuta mondo multe da fervojistoj je adreso: ESPERANTO-RONDO ĉe ZV ROH de Ministerio por trafiko, *Praba 1*, Prikopy 33. Ni respondos ĉium leteron aŭ bildkarton!

Pola Esperanto Asocio, Filio en Gdynia festos sian X jaron en decembro 1967. Okaze de tio estos aranĝita solena letervespero 14. XII.1967. Ni garantias respondon por ĉiu sendaĵo.

Mi estas emerita instruistino, kaj mi deziras korespondi kun sinjorino aŭ sinjoro en Norvegujo. Mi dufoje vizitis vian landon, kaj iris Zis Nordkabo. Fino Florence Baldwin, 73 Lanehouse Road, *Thornaby on Tees*, Yorkshire, Anglujo.

28-jara polo deziras korespondi kun la tuta mondo. Interesoj: joga, psikologio, religioscio, kolektado de bildkartoj kaj revuoj esperantaj. Stanislaw Szkop, Skrytka poczt. 221, *Jenemia Góra 1*, Polujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg.
Telefono: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo.